

Claude Gacond rakontas pri sia poresperanta laboro
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 653, 1983.01.13 & 15

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La korespondado ricevita la pasintan jaron esprimis ĝeneralan kontentiĝon, ke ni plilongigas niajn elsendojn pere de esperanto-kanzonoj. Jen tiurilate kelkajn cirtaĵojn de leteroj:

A.- S-ro **Jiri Patera** en **Praha** Ĉeĥoslovakio skribis: "Mi tre ĝojas, ke vi ofte elsendas la esperantlingvajn kanzonojn de s-ro Tzaut. Tio estas ne nur bela, sed viaj elsendoj tiamaniere fariĝas kvaronhoraj, kio estas tre grava sukceso. Ĉu s-ro Tzaut ne povus surbendigi por vi pluajn kantojn?"

Cl.- S-ro Olivier Tzaut, kiu estas instruisto en montara lernejo en Mont-Soleil (Sun-monto) kaj loĝas en la urbo La Chaux-de-Fonds, iom perdis la kuraĝon kanti en esperanto, ĉar siajn diskojn li vendas multe malpli rapide, ol li esperis. Se oni volas, ke aliaj diskoj aŭ kasedoj aperu, oni iom pli aktive helpu al la disvendado de la jam ekzistantaj diskoj kaj kasedoj. Kaj tiuj ĉi diroj estas tute ĝeneralaj. La esperantistoj havas la kanzonistojn kaj aŭtorojn, kiujn ili meritas.

A.- S-ino **Ella Leeks** en **Ipswich**, Britio ankaŭ ŝatas, ke niajn elsendojn ni malfermu per la esperanto-himno. Ŝi opinias ec, "Ke marŝtempe "La Espero" estas pli gaja ol la originala muzika aranĝo". Ni aŭdigas komencon de malnova disko, kiu fakte estis vigla en sia interpretado.

Cl.- S-ro **Jean-Pierre Vandendaele** en **Lissewege**, Belgio, s-ro **Bruno Najbaro** en **Keighley**, Britio kaj s-ro **František Stejskal** en **Osek**, Ĉeĥoslovakio ankaŭ sin esprimis tre pozitive pri la aŭdigo de kantoj. Ili ankaŭ ŝatas ĝenerale la kantojn de Johán Valano aŭ Claude Piron. Nia ĉeĥa aŭskultanto **František Stejskal** skribis reage al la recenzo de la kasedo Frandu Piron: "Speciale plaĉis al mi la kanzono pri "fromaĝo". La aŭdebleco estis tre bona kaj mi ĝuis la raran momenton, ĉar aŭdi agrablan esperanto-kanzonon estas ĉiam mi diru gaja travivaĵo... Kaj li aldonis: "Ankoraŭ mi volas diri, ke mi estas ĉiam kontenta kun la enhavo kaj nivelo de viaj elsendoj, kvankam ili estas nur mallongaj."

A.- Kiel estas por la kanzonistoj, tiel ankaŭ estas por la radio-elsendejoj. La tempo por esperanto tutcerte estas en rekta rilato kun la skribaj reagoj de la aŭskultantoj. Pro tio ni dankas al ĉiuj, kiuj nutras nian leterujon, kiun ni tutcerte ne sufiĉe orfite malfermis la pasintajn jarojn. La kaŭzo estas nia streĉa laboro.

Cl.- Pri tiu ĉi laboro ni iomete rakontos al vi, ĉar pluraj geaŭdantoj esprimis sian deziron iom konatiĝi kun ni, kaj ne nur kum niaj voĉoj kaj niaj ideoj.

A.- Mia edzo dividas sian tempon inter pluraj okupoj, kiuj estas pli aŭ malpli vivtenaj. La duonon de sia tempo profesia li ŝuldas al la elementa lernejo. Gelernantojn de la kvara kaj kvina lerneja jaro li instruas kun kolemino. Ambaŭ dividas inter si la instru-laboron kaj ankaŭ necese la salajron.

Cl.- La alian duonon de mia tempo mi dediĉas al esperanto. La pasintan semajnon ni rakontis, ke en 1967 ni fondis la Centron de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. La postan jaron, do en 1968, mi fondis la Kulturan

Centron Esperantistan, kiu fariĝas pli kaj pli konata, por siaj eldonaĵoj, la kajeroj de la kolekto Studoj, sia libroservo, siaj kursoj kaj esperanto-staĝoj, kiuj disvolviĝas la tutan jaron sub la titolo Internacia Feria Altlernejo kaj fine pro sia Gastejo Edmond Privat, kiu jam posedas tri domojn, kiujn ĝi transformas.

A.- Mia edzo estas fakte la direktoro de tiu Kultura Centro Esperantista kaj de ties fakoj. Inter ili ankaŭ troviĝas la Komisiono "Esperanto Lernejo".

Cl.- Kiel la plimulto de la esperanto-institucioj, Kultura Centro Esperantista estas nekapabla salajri sian direktoron. Ĝojige la porradia laboro, kiun ni plenumas jam ekde dudek jaroj, estas salajrata Tiel ni povas tamen iom kompletigi nian vivtenadon. Nia espero estas, ke foje ankaŭ Kultura Centro Esperantista kaj ties fakoj povos normale salajri ties funkciulojn. Inter ili troviĝas nuntempe esperanto-instruisto noma Stefano Keller. La aliaj laboras absolute bonvole, escepte la docentoj de la Internacia Feria Altlernejo, kiuj ricevas normalan salajron de instruisto por sia instruado.

A.- Ni rakontas ĉion tion, por ke vi konu iomete niajn zorgojn kaj okupojn. Mi mem jam ekde baldaŭ dekkvin jaroj prizorgas la funkciadon de la libro-servo de Kultura Centro Esperantista. Pri la libro-mendoj kaj la ordigado de la alvenantaj libroj mi okupiĝas.

C1.- Tiu ĉi libro-servo komencis sian vivon en 1970 pere de monprunto de mil svisaj frankoj. La profito de la vendoj utiliĝis en la aĉetado de novaj libroj, kaj tiel iom post iom riĉiĝis la librostoko. Nun ĝi plenigas la bretojn de bela kaj riĉa magazeno, kies inventario atingis pli ol sesdek mil svisajn frankojn fine de la pasinta jaro. Tio ĉi estis ebla, ĉar ne devis esti servataj salajroj al la funkciuloj de tiu servo.

A.- La gastoj de nia Gastejo Edmond Privat ofte informiĝas, ĉu Edmond Privat estis riĉulo. Ili kredas, ke la gastejo estas la rezulto de lia malavareco. Fakte Edmond Privat kaj lia edzino Yvonne vivis tre modeste en Neuchâtel. Sian tutan tempon kaj energion ili vere dediĉis al esperanto kaj al diversaj aliaj idealoj. Se ili ne riĉis je mono, ili almenaŭ riĉis je amikoj. Estas je ilia memoro, ke la gastejo, kiun ni fondis, ricevis ilian nomon, kaj ne pro iu ajn financa kaŭzo.

Cl.- Do kiel alvenis la necesaj financaj rimedoj, demandas la gastoj. Tute simple, la fondumo Gastejo Edmond Privat ricevis la statuson de ŝparkaso. A1 tiu ĉi banko la esperantistoj povis fari alpruntojn, kiujn la fondumo rentumas je tute normala interezo de 4,5 procentoj. Kaj la koncerna mono estas investita en la aĉetado kaj modernigo de la koncernaj domoj. Entute la fondumo Gastejo Edmond Privat antaŭvidas aĉeti kaj transformi sep domojn, kiuj situas en tre kvieta kvartalo de la urbo La Chaux-de-Fonds, tute proksime de la arbaro kaj de la paŝtejoj. Ĉirkaŭas la domojn vastaj ĝardenoj. Oni malfacile trovas pli adekvatan domaron por starigi studejon.

A.- Kio estas sciinda, tio estas, ke tiuj sep domoj estis konstruitaj en la jaro 1925, kaj ke ĝuste en tiu ĉi jaro Edmond Privat fondis la Internacian Someran Universitaton kadre de la Universala Kongreso, kiu tiam okazis en la urbo Ĝenevo. La fondumo Edmond Privat estis fondita en 1975, do ekzakte kvindek jarojn poste. Kaj nun la du unuaj domoj, kiuj ricevis la nomojn de la esperanto-pioniroj Ernest Naville kaj Pierre Bovet posedas tri, baldaŭ kvar, klasejojn, kie povas disvolviĝi la aktiveco de la Internacia Feria Altlernejo, kies instru-fakoj ne nur estas esperanto kaj ties instruado, sed ankaŭ la interpopola konduto.

Cl.- Al la starigo de tiuj ĉi esperanto-centroj ni dediĉis niajn fortojn kaj nian tempon, kaj ilia kuraĝiga disvolviĝo donas al ni la kuraĝon daŭrigi la laboron.

A.- Karaj aŭskultantoj, eble la jaro 1983 vidos vin veni en La Chaux-de-Fonds por gastigi en tiu ĉi esperanto-vilaĝo. Vi sciu, ke vi estas bonvenaj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond diras : ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.Esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012*